



Bulgaria ESPERANTISTO





ciferoj — kaj vi ricevos penson pri la stato de la virino en la homa socio.
Inter tiuj, kiuj solvos la enigmon, ni lotumos E-librojn. La respondojn sendu ĝis la 30 de majo.

ENHAVO

* * * La ĉefa evento de nia jarcento	1
* * * Verda tabulo	2
Nikola Aleksiev. Monda forumo de la pacamaj fortoj en Moskvo. Delegi- taro de MEM partoprenis	3
Fl. N. Solena vespero	4
Ljuba Bojaĝieva. Por la feliĉo . . .	4
Anna Mindova. Amdoloro	4
B. Kavalĝiev. 50 jaroj por Esperanto	4
Anton Antonov. Impona E-renkontiĝo en Kubrat	5
Bojko Ĉolakov. En Dospat	5
Georgi Dimov. Varna sin turnas al la juna generacio	6
Goĉo Koev. Jarkunveno de «Kolombo de la paco»	6
* * * Propagandaj E-kunvenoj . . .	6
Draguŝko Petrov. E-kurso de la centra poŝtoŝeĉejo en Ruse	6
Neno Janev. Propaganda E-agado en Gabrovo-distrikto	7
Vasil Mitovski. Internacia Esperanto- kurso «Pisanica»	7
Canko Mirgin. Lumo sur iom nebulan epizodon	8
Ĥrima. Kredo ŝprucis el liaj okuloj	10
Dimitro Haĝiev. Esperanto en libro pri Sevlievo kaj ĝia regiono . . .	12
Romano Grinŝpan. Pri la naciaj kore- spondaj servoj	13
* * * Koncize	14
* * * Aktiveco de S. Kraĵnov en Kaŭ- kazo	14
N. Aleksieva. Ne tiel, sed tiel ĉi . .	15
A. Loznevoj. La vosto	16
* * * La sportisto Frederic Joliot- Curie	III
D. H. Notinda fakto	III
* * * Konkurso de «Monda Turismo»	II

Sur la kovrilpaĝo :

La partoprenantoj en VARE (vd. paĝon 5)

Fotoj : La prezidantaro de VARE (vd. p. 5)

La prezidantaro de la jarkunveno de
E-societo «Kolombo de la paco». Rapo-
rtas Kanjo Kanev (vd. paĝon 6).

8-MARTA ENIGMO

3—6—16—12—1 : Insekto
8—13—14—11—1 : Mambesto kun va-
lora felo
15—10—8—9—17—1 : Urbo en Italio
7—8—9—10—5—1 : Ĉefurbo en Eŭropo
15—10—7—4—9—8—1 : Nukso

Se vi ĝuste trovos la supre postulatajn
vortojn, por vi estiĝos klare, kiu litero
al kiu cifero respondas.

Anstataŭigu la ciferojn en la granda
litero M per la trovitaj signifoj de la

Rajna Sotirova



LA ĈEFA EVENTO DE NIA JARCENTO

La bulgaraj esperantistoj kune kun la tuta bulgara popolo renkontis kun sincera ĝojo kaj profunda kontento la decidon de la Politika Buroo de CK de la Bulgara Komunista Partio pri celebrazo de la 60-jariĝo de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio. Ĉar sen la Granda Oktobro de la sovetaj popoloj ne eblus la Granda Septembro de la bulgara popolo. Nia socialisma revolucio de septembro 1944 estas natura kontinuo de la Oktobra Revolucio en 1917.

„Dek tagoj, kiuj skuis la mondon“ — tiel siatempe la usona verkisto Ĝon Riĵd (John Reed) titolis sian faman libron dediĉitan al Oktobro. La salvo de „Aŭroro“ (Aŭroro) anoncis la naskiĝon de la nova mondo, la komenciĝon de la vera homa historio — la historion de la socialisma kaj komunisma socio. Tiu ĉi vero estas evidenta kiel por la amikoj de la nova mondo, kiu naskiĝas kune kun la venko de la revolucio, tiel ankaŭ por ĝiaj malamikoj.

Preskaŭ tutan jarcenton la ideoj de la marksismo estis nur teorio, scienca teorio pri la socialismo, kiu montris la neeviteblan pereon de la ekspluatista kapitalisma socio kaj la historie legkonforman neceson de la venko de l'komunismo. Tiu ĉi teorio estis la plej potenca batalilo en la manoj de la laboruloj en la tuta mondo. Sed la malamikoj de la socialismo — tute egale ĉu politikistoj aŭ filozofoj, ĉu pastroj aŭ policianoj — obstine klopodis kaj klopodas pruvigi, ke tiu ĉi teorio estas neefektivebla. Ili timigas la filistrojn per „teruraĵoj“ de la revolucio, profetas, ke la venko de la socialismo signifus finon de la mondo.

Sed jen en Rusio la revolucio venkis. Sur unu sesono de la terglobo oni konstruas la plej liberan kaj plej justan socion, kian la homaro konas en sia tuta historio. En USSR oni kreis vere demokratian ŝtatpotencon de la laboruloj, kiu certigas neviditajn kaj neblajn ĉe la kapitalismo liberecon kaj justecon por la homoj de la laboro. Kaj neniaj hipokritaj kompatoj, falsigoj, kalumnioj kaj demagogaj insidoj de la imperiismaj centraloj kaj de la burĝa propagando povas mallumigi la helan heroaĵon de la soveta popolo, kiu entuziasme konstruis kaj perbruste brave defendis la novan socialisman socion sur unu sesono de la monda teritorio. Tiu popolo transformis postrestintan Rusion en plej potencan industrian ŝtaton, en socialan laboratorion de la nova mondo, en fortikaĵon de la tutmonda paco, en guidan forton de la scienca kaj teknika progreso, en pioniron de la kosma konkero, en ŝtaton de plej alta socialisma demokratio.

Hodiaŭ nur dum du tagoj kaj duono la soveta industrio produktas tiom, kiom estis produktita dum la tuta 1913 jaro en cara Rusio, la amplekso de la agrikultura produktaĵo en USSR kreskis 4.4-foje, la realaj enspezoj de la laboruloj kreskis 14-foje. En la antaŭrevolucia Rusio ĉirkaŭ tri kvaronoj de la loĝantaro estis analfabetaj. Nun tri kvaronoj de la laboruloj, okupitaj en la nacia ekonomiko, havas superan an mezajn instruistojn!

Tiuj ĉi faktoj de si mem elokvente parolas, ke la ĉefa celo de la revolucio, de la socialisma socio — tio estas la konstruado, la kreado por la bono kaj la feliĉo de la homo! En tiu ĉi rilato nenio en la historio de la homaro povas kompari sin kun la socialismo kiel socia sistemo. Kaj tio finfine difinas la historian nesupereblecon de tiu sistemo, ĝian finan venkon en la klasa batalo por la nova mondo.

La ekzemplo de USSR entuziasmigas la laborulojn de nia tuta planedo. Post la Dua Mondmilito la socialismo ĵariĝis monda sistemo, ĉefa forto en la historia disvolviĝo de la homaro. Hodiaŭ la matura socialismo estas la plej alta pinto de la socia progreso — tio estas senduba vero por ĉiuj honestaj homoj sur la tero.

La bulgara popolo, ĵama pro sia liberamo, pro siaj ĉiuj heroaj bataloj por nacia sendependado kaj socia justeco, hodiaŭ estas en la fruntaj vicoj de la konstruantoj de nova mondo. La flago de Oktobro estas ankaŭ ĝia flago, ĝia fiero. Tial nia tuta popolo renkontos la Grandan Oktobron per novaj grandaj faroj sur la vojo de la socialisma konstruado. Kaj ĝi solene festos ĝin kiel sian propran feston.

La bulgaraj esperantistoj, krome, devas plue vastigi kaj aktivigi siajn ligojn kun la sovetaj esperantistoj. Ili devas uzi Esperanton en la ĉiutaga praktika laboro por plua fortikigo kaj florado de la vivokrea bulgara-soveta amikeco, uzi ĝin en la ĉiam kreskanta ĉiuflanka kunlaborado kaj integriĝo de niaj du frataj popoloj.

VERDA TABULO

En la abonkampanjo de „Bulgara Esperantisto“ por 1977 j. E-societo „Fajrero“ en la malgranda urbo Dospat, distrikto de Smoljan, atingis brilan sukceson: ĝi kolektis **222 abonojn** kaj okupis la unuan lokon en la lando!

Por tiu sukceso kontribuis:

Emil Ĉirpanski — kolektis 140 abonojn,

Velurina Ĉirpanska — kolektis 50 abonojn,

Bojka Girozdanova — kolektis 32 abonojn.

Koran dankon al niaj avangarduloj! Sekvu ilian ekzemplon!

Jen ankaŭ la rezultoj pri kelkaj aliaj urboj, kiuj kolektis pli ol 100 abonojn:

Sofia — 354

Ruse — 191

Plovdiv — 183

Kazanlâk — 161

Stara Zagora — 159

Smoljan — 155

Varna — 154

Kubrat — 128

Loveĉ — 104



Velurina Ĉirpanska
Bojka Girozdanova
Emil Ĉirpanski

Ĉar oni certe interesigus pri la situacio en ĉiuj distriktoj, ni donas la koncernajn rezultojn kredante, ke la komparo estos pensiga kaj utila:

Smoljan	— 475
Stara Zagora	— 442
Plovdiv	— 256
Ruse	— 243
Pazarĝik	— 225
V. Târnovo	— 191
Loveĉ	— 181
Razgrad	— 165
Varna	— 158
Ŝumen	— 136
Gabrovo	— 124
Ĥaskovo	— 121
Pleven	— 97
Vraca	— 84

Blagoevgrad	— 80
Sofia	— 64
Burgas	— 62
Târgoviŝte	— 57
Kjustendil	— 53
Jambol	— 43
Pernik	— 38
Vidin	— 32
Sliven	— 25
Miĥajlovgrad	— 21
Ťolbuhin	— 18
Kârgali	— 15
Silistra	— 8

MONDA FORUMO DE LA PACAMAJ FORTOJ EN MOSKVO. DELEGITARO DE MEM PARTOPRENIS

En januaro en Moskvo okazis Monda Forumo de la Pacamaj Fortoj. Ĝiestis organizita de la Komitato por Daŭrigo de la Aktivecoj de la Monda Kongreso de Pacamaj Fortoj (Moskvo, 1973) kaj havis la gravan taskon pridiskuti la ĉefajn aspektojn de la ekzistanta malstreĉiĝo en la internaciaj rilatoj kaj ĝian pluan stabiligon kiel universala kaj ĉiam pli profundiganta fenomeno en intereso de la ĝenerala senarmigiĝo.

Nun la ĉefvojo al paco en la mondo estas la transformigo de la malstreĉiĝo en nereturneblan proceson. Tio signifas, ke la politika malstreĉeco devas esti materialigita en ĝeneralan malarmigon. La alia alternativo estas: monda termonuklea milito, kiu venigos la mondon al katastrofo!

Politikaj partioj, sindikataj, virinaj, junulaj, religiaj kaj aliaj organizaĵoj kaj movadoj, elstaraj mondkonataj personecoj en la politika, ekonomia, socia kaj kultura vivo — ĉiuj serioze pensantaj pri la estonteco de la homaro pacamaj fortoj sendis al Moskvo 500 siajn elstarajn reprezentantojn, kiuj partoprenis la amikan diskutadon pri novaj formoj kaj manieroj organizi pli amasan kaj multe pli fortan mondan publikan opinion favore al paca solvo de la internaciaj konfliktoj, por sekureco kaj kunlaborado, por paca kunekzistado de ŝtatoj kun malsimila socia sistemo.

En dektri diskutgrupoj la delegitoj, venintaj el 115 landoj de ĉiuj kvin kontinentoj, pridiskutis la aspektojn de tiu plej esperiga fenomeno de nia nuntempo — la malstreĉiĝo. Oni serĉis el diversaj pozicioj kaj finfine trovis en konsento la konkretajn proponojn, kiamaniere transformi la malstreĉiĝon en universalan nerenverseblan proceson. Tiu profundigita malstreĉiĝo estas kapabla doni realan direkton al la ideo pri senarmigiĝo kaj helpas la kunvokon de la aprobita de UNO propono

de Sovetunio kaj de la ceteraj socialismaj landoj pri monda konferenco por malarmigiĝo.

La Forumo donis sian kontribuon por proksimigi tiunege sopiratan de la homaro momenton, kiu savos la homan kulturon kaj mem la vivon de la homaro kontraŭ katastrofa termonuklea milito.

La Forumo estis nova paŝo al plua kunlaborado de diverstendencaj pacfortoj por komunaj aktivecoj favore al la ĉefa tendenco de nia epoko — malstreĉiĝo, sekureco, kunlaborado, malarmigiĝo, proklamitaj ankaŭ en la Fina Akto de la Eŭropa Konferenco kaj Kunlaboro en Helsinki (1975).

La laboron de la Forumo partoprenis delegitaro de MEM, konsistanta el la subskribinto kaj el la vicprezidanto de MEM prof. d-ro M. I. Isaev — persone konata al la bulgaraj esperantistoj, prezidanto de la Komisiono por Internaciaj Ligoj de la Sovetaj Esperantistoj ĉe la prestiĝa en la tuta mondo Unuiĝo de la Sovetaj Societoj por Amikeco (ruslingve mallongigo: SSOD). Ni ambaŭ partoprenis la diskutadon en du malsamaj grupoj kaj faris konkretajn proponojn, rakontante al la ĉeestantoj koncize pri MEM kaj ĝia agado inter la monda esperantistaro favore al la malstreĉeco kaj al la malarmigiĝo.

La Monda Forumo de Pacamaj Fortoj en Moskvo pasis sukcese, kaj tio estas kontribuo ankaŭ por plua mobilizado de novaj kaj novaj fortoj ĉirkaŭ la konkreta programo por estonta kunlaborado de la pacfortoj. La Forumo estis ankaŭ siaspeca antaŭvespero al la okazonta en Varsovio komence de majo Monda Asembleo de la Packonstruantoj, en kiu same partoprenos kelkmembra delegitaro de MEM.

*Nikola Aleksiev,
prezidanto de MEM*



Solena vespero

En la ĉefurba kunvenejo de E-societo „Maksim Gorkij“ la 2-an de februaro membroj de la Literatura E-Rondo en Sofio okazigis solenan vesperon dediĉitan al la verkaro de s-anino Ljuba Bojaĝieva.

Literaturan portreton al nia E-verkistino faris Rajna Arnaudova.. Konvinke kaj interese ŝi prezentis la buntan paĉetron de la poetino kiel konscienca civitanino, patrino, esperantistino kaj pacdefendanto. Verkojn de Bojaĝieva emociplene recitis Vera Vâĵarova, Miŝo Zdravev, Sabina Kovaĉeva, Morjana Vâlleva, Flori Nikolov, Ĵorĵeta Zdraveva, Galina Spasova, Teodora Zdraveva.

Fl. N.

50 JAROJ POR ESPERANTO

En Ruse la membroj de E-societo „Libero“ celebris la 50-jaran E-vivon kaj agadon de la E-veterano Georgi Boĵkov. Li fariĝis esperantisto en 1926 j.

Post la tre interesaj rememoroj de la celebrato mem, pri lia agado parolis multaj „Libero“-anoj. Ĉiuj montris lin kiel ekzemplon kaj meritulon por la esperantistaro de Ruse. Boĵkov estis prezidanto de „Libero“, membro de CK de BEA, prezidanto de DK de BEA en Ruse. Dum 50 jaroj li fidele kaj abnegacie laboris por disvastigo de Esperanto kaj fortikigo de la E-movado en la distrikto kaj la lando.

B. Kavalĝiev

L. Bojaĝieva

POR LA FELIĈO

Al ni la feliĉo ne venas subite!
Nek urĝe ĝi venas,
nek neatendite.
Ĝi ne alpaŝas triumfe kun kantoj
kaj floraj girlandoj
por kapti la koron fideman —
en brusto la birdon flirtantan —
kaj tie por ĉiam resti reganta
ĝis fino de l'mondo.

Feliĉon oni ne povas aĉeti
per oro deloge sonora,
nek per kortuŝe larmaj okuloj
ĝian favoron povas elpeti,
kiel petanto mizera almozas
sian obolon ĉe strata angulo. . .

Por la feliĉo ni devas batali!

Paŝo post paŝo, kun pacienco,
post lukto tre longa,
persista,
ni devas la revon alproksimigi. . .

Dum la konkera batal' por feliĉo
ni, eble, sangmakuliĝos!
Ni, eble — venkitaj — en polvon eĉ falos!
Sed lasi la lukton ni rajtas neniam,
kaj ĉiam post falo —
simile al mita Fenikso —
el cindro varmega
ni reviviĝos.
Kaj pretaj ni estos por nova batalo!

Por la feliĉo!

Anna Mindova

AMDOLORO

Miaj sentoj ofte jam revenas
ĉiam al la januar-maten'. . .
Kaj subite ĝojo min ekprenas,
sed vekiĝas ankaŭ la ĉagren'.

Kiel eĥo rememoro sonas,
vian voĉon portas vent' al mi.
Sed teneron vane mi disdonas, —
sentas mi abismon inter ni.

Velkas jam la am' en mia koro,
miaj sentoj — preskaŭ en ruin'.
Ne forvelkas nur la amdoloro,
ne kutimas mi pri tia fin'!

Min malfruiginta amo lulas,
sonas en mi la amara vort'.
Mia vivo en soleco brulas —
nin dividas senkompata sort'.



La 12-an de februaro j. k. nia E-veterano Atanas D. Atanasov — ADA, vicprezidanto de la Akademio de Esperanto, atingis sian 85-jaran aĝon. Seninterrompe, en daŭro de preskaŭ tutaj 70 jaroj, li laboras fervore kaj sindone por la disvastigo de nia lingvo, por la firmigo de nialanda E-movado. Per siaj vivo kaj agado li servas al ni kiel ekzemplo de fidela esperantisto.

Ni sincere bondeziras al s-ano Atanasov multjaran bonfarton kaj feliĉon!

ORGANIZA VIVO

IMPONA E-RENKONTIĜO EN KUBRAT

La tradicia Vintra Amikeca Renkontiĝo Esperantista (VARE) en urbo Kubrat ĉi-jare okazis je la fino de januaro kune kun la 20-jara jubileo de la urba E-societo „Progreso“. Partoprenis 140 geesperantistoj el 10 urboj de nordorienta Bulgario kaj 7 gastoj el eksterlando (Hungario, Pollando, ĈSSR).

La duobla festo estis malfermita de VARE-komitatano Anton Antonov. Grupeto de lernantinoj el la loka teknikumo prezentis programon. Infanoj enmanigis diantojn al la prezidantaro. Raporton pri la 20-jara agado de „Progreso“ faris la societa prezidanto Hristo Dimitrov. Li notis, ke dum tiu ĉi ne longa periodo estis preparitaj ĉ. 400 esperantistoj, kiuj per sia internacia korespondado, reciproka gastigado, internaciaj renkontiĝoj ka. konstante popularigis la ĉiuf flankajn atingojn de nia socialisma patrolando. Dimitrov menciis ankaŭ kelkajn pli gravajn iniciatojn de „Progreso“ dum la sekvaj jaroj: starigo de monumento de Zamenhof, nomigo de la urba hospitalo al Zamenhof, havigo de propra klubejo ktp.

En sia salutparolado Minka Kozareva, membro de UK de BKP, esprimante dankon pri la fruktodona laboro de la urba esperantistaro, deklaris ĉiuf flankan helpon al „Progreso“ en ĝia nobla kulturkleriga kaj pacama laboro. En la nomo de CE de BEA salutojn prezentis ties organiza sekretario Krăstiu Karucin. El Pollando salutis Jolanta Korsak, el ĈSSR — Anton Zahariaș. Salutis ankaŭ Petro Kolev — unu el la fondintoj de „Progreso“, kaj la reprezentantoj el Razgrad, Ruse, Iseriŝi, G. Orjaŝovica, Ŝumen, Preslav, Pleven, Tolbuhin, Vărbica. Al la societo-jubileulo ili prezentis donacojn. Ankaŭ la societa estraro enmanigis donacojn al kelkaj siaj aktivuloj.

La dua parto de la aranĝo okazis en la restoracio „La Tilioj“. Post amika vespermangxo oni ĝuis bonan orkestron, dancojn, ŝercojn, tombolon ka. La sekvanta tago post nelonga

kunsido kun k-do Karucin oni matenmanĝis kaj direktiĝis al la arbardomo je distanco de 4 km ekster la urbo. Survoje — gaja babilado, kantoj, ridoj. La fotoaparatoj konstante klakis por eternigi tiun plezurigan renkontiĝon en tiu belega suna tago. Ni tagmanĝis laŭplacxe en la alloga arbardometo.

Laŭdinde dum la renkontiĝo funkciis E-bazaro. Oni disponigis al la gastoj 10 specojn de E-insignoj, ĉiugradajn lernolibrojn, gramofondiskojn, flagetojn, emblemojn, poŝtranĉiletojn, etikedojn — ĉiuj kun E-surskribo. Bone funkciis ankaŭ la poŝtagentejo, proponante bk, pm, kovertojn ks. kun esperantlingva surskribo.

Oni disiĝis kun la promeso sekvontjare partopreni pli amase en VARE lige kun la 63-a UK de Esperanto en Varna. VARE-77 finiĝis, sed restis la tradicio: estu VARE ĉiujare lastsabaton januare!

Anton Antonov

La E-lernojaro en Dospat

La nova Esperanta lernojaro en urbo Dospat komenciĝis ĝustatempe kaj estis tre bone organizita. La estraro de E-societo „Fajrero“ faris grandan perafiaŝan propagandon. En mezlernejo „Dimitro Blagoev“ estis organizita E-ekspozicio.

Funkcias kelkaj kursoj. En la urbo — por gejunuloj. Krome en decembro estis organizita intensa kurso por partoprenontoj en ekskurso al Pollando. Dudek kvar niaj membroj veturis tien.

En mezlernejo „Dimitro Blagoev“ funkcias 3 elementaj kursoj po 35 lernantoj kaj 2 kursoj por progresintaj po 30 lernantoj. La kursoj estas en diversaj klasoj, ekz. la elementaj — en la sesaj, okaz kaj naŭaj klasoj, por progresintaj — en la sepaj kaj dekaĵaj klasoj. Ĉiuj estas gvidataj de la E-instruistoj Velurina Ĉirpanska kaj Emil Ĉirpanski.

Bojko Ĉolakov



*„Vintre dormas ĉiu planto,
tamen floras Esperanto!“*

La Internaciaj Instruistaj Kursoj de Esperanto en Burgas — Meden Rudnik jam donas siajn fruktojn. Ĉiujare DE en BEA en Varna sendas al ili instruistojn. La partoprenkotizon ne pagas la instruistoj, sed pri tio zorgas DE. Kaj la fruktoj ne malfruis. Nun en Varna kaj ĝia distrikto funkcias jenaj E-kursoj:

a) En lernejo „Aleko Konstantinov“ — kvartalo „Asparuhovo“, la diplomita instruistino Dobrinka Trâpkova gvidas kurson kun 32 gelernantoj.

b) En la politeknika lernejo „Maurice Torez“ komenciĝis kurso kun sepjaraj infanoj. La kurson gvidas la instruistino Marija Todoŝeva. Samideano, kiu ĉeestis lecionon de Todoŝeva, entuziasmigita konfesis: „Ne ekzistas pli kortuŝa, pli emocia vidaĵo ol tiu — rigardi kiel serioze la ĉarmaj infanetoj lernas la Internacian Lingvon kaj aŭdi el iliaj buŝetoj dolĉan kaj senriproĉan Esperanto-parolon kaj kantojn...“

c) En vilaĝo Goren Ĉiflik, distrikto de Varna, oni fondis gelernantan E-societon „Teĉka Karamfilova“ je la nomo de la heroa

partizanino, pereinta en la batalo kontraŭ la faŝismo. Prezidantino kaj samtempe kursgv-
dantino estas la instruistino Ginka Petrova. La kurson partoprenas 23 gelernantoj el la 28-membra societo.

d) En la Supera Maŝinelektra Instituto en Varna kurson por studentoj gvidas la studento Emil Dimov. En la instituto funkcias E-societo „Verda Torĉo“ kun 17 membroj.

e) En VINS „Dimitro Blagoev“ — Varna, kie Esperanto estas fakultative instruata, funkcias du kursoj — por komencantoj kaj por progresintoj. Ambaŭ kursojn gvidas doc. Georgi Dimov. En ili partoprenas ankaŭ civitanoj.

f) En la muzika mezlernejo „Dobri Ĥristov“ — Varna, laŭ iniciato de la direktoro Rajĉev, ekfunkciis kurso por komencantoj kun 40 gelernantoj, gvidata de G. Dimov. Ili lernas kun aparta entuziasmo, ĉar la muziko kaj Esperanto estas internaciaj lingvoj.

Jes, Varna sin turnas al la plej juna ĝeneracio!

Georgi Dimov

JARKUNVENO DE „KOLOMBO DE LA PACO“ EN GÂLÂBOVO

La 15-an de januaro en u. Ĝâlâbovo, distrikto de Stara Zagora, okazis la jara kunveno de la loka E-societo „Kolombo de la paco“. En la prezidantaro sidis oficialaj gastoj: T. Kolev — sekretario de UK de BKP, A. Matev — prezidanto de UK de Patrolanda Fronto, la prezidanto de DE de BEA Rajno Ĉipilev, la prezidantoj de la E-societoj en la urboj Ĉirpan kaj Marica P. Petkov kaj T. Kurtev ka.

Raporton pri la unujara agado faris Kanjo Kanev — prezidanto de la E-societo. Li notis gravajn atingojn en ĉiuj sektoroj de la societa agado. En 1976 la societo havis 70 regulajn membrojn kaj nun, lige kun la gravaj datrevenoj — la 90-jariĝo de Esperanto kaj

la 70-jariĝo de BEA — la nombro kreskis je 80—ĉiuj pagintaj la membrokotizon por 1977 j.

Salutparoladojn faris T. Kolev, R. Ĉipilev, P. Petrov, T. Kurtev.

Oni vigle diskutis la societan agadon. Estis elektita nova estraro kun prezidanto K. Kanev, ankaŭ estraroj de la junulara, turista kaj „Fo-ki-ma“ — sekcioj. Al la distinguloj en la societa agado oni enmanigis donacojn.

En la tuta kunveno regis granda entuziasmo kaj laborpreteco. Oni faris fotojn kaj filmeton.

Post la kunveno okazis amika vespero kun varia programo en tre agrabla etoso.

Goĉo Koev

PROPAGANDAJ E-KUNVENOJ

En decembro 1976 prof. d-ro Stojan Ĝugev, membro de la Akademio de Esperanto, parolis 2-foje je temo „Naciaj kulturoj kaj la Internacia Lingvo“ antaŭ naesperantista publiko — en Plovdiv (300 aŭskultantoj) kaj en Varna (en la Supera Instituto de Nacia Ekonomiko „D. Blagoev“). La lasta kunveno estis organizita de la Distrikta kaj Urba komitatoj de Patrolanda Fronto, la Asocio de Sciencaj Agantoj — filio en Varna, kaj DE de BEA. La prelegon oni surbendigis por la arkivo de DE.

E-kurso ĉe la centra poŝtoŝicejo en Ruse

Komence de januaro ĉe la centra poŝtoŝicejo en Ruse ekfunkciis E-kurso. Ĝin partoprenas 20 junaj gepoŝtistoj. Kursgv-
danto estas Ivan Slavov — el la centra poŝtejo.

La administra kaj sindikata estraroj disponigis bonegajn kondiĉojn por la kurso kaj pagis parton de ĝiaj elspezoj. Ili rezervis 10 kolektojn de revuo „Bulgara Esperantis-o“ por tiuj gekursanoj, kiuj havos plej bonan sukceson ĉe la lernado de Esperanto.

Draguŝko Petrov



Kvar tago'n komence de februaro en la distrikto de Gabrovo estis k-do Kunco Valev — sekretario de CE de BEA.

En urbo Sevlievo li parolis antaŭ 80 lernantoj en la te'nika lerne'o de maŝin'konstruado „Generalo Ivan Bačvarov“ pri la lingva aspekto de la internaciaj rilatoj. Li emfazis la utilon, kiun Esperanto donas al la lernantoj por al'igo de ilia ĝenerala kaj lingva kulturo kaj por ilia humanisma edukado.

Parolante pri la lingva problemo en kunveno de 40 geinstruistoj en la gimnazio „Cvijatko Ganev“ k-do Valev substrexis la akran bezonon pri E-instruistoj kaj montris diversan instruformon por la profesiaj instruistoj, en kiuj ili povas esperantistiĝi kaj ricevi diplomon pri instruaĵo de Esperanto. Kelkaj instruistoj tuj montris viglan intereson pri ĉeestaj kaj korespondaj E-kursoj.

En u. Drjanovo okazis tri kunvenoj. En la gimnazio „Maksim Rajkovič“ k-do Valev parolis samtempe al la tuta kolektivo de lernantoj kaj instruistoj (600 personoj) pere de moderna televida instalaĵo. Ne forlasante siajn benkojn kaj ĉambrojn la lernantoj aŭskultis kaj samtempe observis la parolanton.

En la urba kinosalono li parolis antaŭ 400 gelernantoj kaj instruistoj el la Ekonomia Teknikumo. Ĉi-foje la E-temo ne estis tute nova por la kolektivo, ĉar en la lerne'o funkcias E-kursoj — elementa kaj daŭriga, gvidataj de instruistino Elka Valčova.

Posttagmeze akompanate de lokaj esperantistoj k-do Valev vizitis la unuan sekretarion de UK de BKP k-dinon Paskaleva, kiu en duonhora konversacio esprimis pozitivan rilaton al Esperanto kaj promesis helpi la agadon de la loka E-societo „Ivan Vladkov“, ankaŭ helpi instigon de profesiaj instruistoj al E-kursoj.

Vespere okazis kunveno de la lokaj esperantistoj, en kiu k-do Valev majstre gvidis parolekzercon kun ne tre spertraj esperantistoj kaj poste starigis la plej gravajn taskojn de nia Movado nun. Li emfazis, ke oni devas prepari sin bone por inde renkonti la antaŭ-

staranta'n datreveno'n — la 90-jariĝon de Esperanto, la 70-jariĝon de BEA kaj la 63-an UK de Esperanto en nia lando en 1978.

En Gabrovo okazis propaganda kunveno por lernantoj-aktivuloj kaj instruistoj en la gimnazio „Vasil Aprilov“. Kortuŝe parolis k-do Valev pri la tempo, kiam li antaŭ la Naŭa de Septembro* esperantistiĝis ĉi tie en kurso, gvidata de la konata E-lektoro el Vraca Radoslav Trič'ov. Konvin'e parolante pri la lingva problemo en la hodiaŭa internacia vivo li alvokis la lernantaron lerni la Internacian Lingvon kaj porti pluen la verdan torĉon.

Tre grava kaj rezultodona estis la renkontiĝo de k-do Valev kun 25 geinstruistoj el diversaj lernejoj de la urbo, kiu okazis en salono de la Distrikta Popola Soveto. Fine de la kunveno 15 geinstruistoj enskribis sin por E-kurso. Nia g'sto poste parolis en kunveno de ĉ. 40 farmaciistoj en la Kulturdomo.

La lasta tago de lia restado en Gabrovo estis dediĉita nur al la esperantistoj. Kvarhora renkontiĝo kun ili okazis en salono de la Kulturdomo. Ĉeestis samideanoj el Gabrovo, Sevlievo, Drjanovo k-do Valev leĝis pri tielaj lingvaj demandoj por la bulgaraj esperantistoj, donante abundajn konsilajn ekzemplojn. Post la paŭzo li tuŝis temon el la historio de Esperanto, parolante pri la poezia verkaro de Zamenhof. Fine li starigis la plej gravajn taskojn antaŭ nia E-Movado nun.

Ni kredas, ke la semoj, kiujn nia sekretario tiel entuziasme kaj konvin'e ĵetis en la animojn de pli ol 1300 homoj, plejparte lernantoj kaj instruistoj, ne restos sen fruktoj. Nun la zorgon plue flegi la semojn kaj la ĝermojn havas la distrikta kaj la societaj E-estroj.

* T. e. antaŭ la liberigo de nia lando el la faŝismo.

Neno Janev

INTERNACIA ESPERANTO-KURSEJO „PISANICA“

Antaŭ 1964 j. la E-movado en la distrikto de Smoljan vegetis. Fortan puŝon antaŭen donis Jordan Jordanov, kiu en tiu ĉi jaro venis por labori tie. Kune kun la kolektiĝintaj ĉirkaŭ li plenmano da entuziasmoj li sukcesis krei viglan E-movadon en la tuta distrikto, fari ĝin bastiono de la bulgara E-movado. Nun en tiu relative malgranda distrikto (163000 loĝantoj) aktivas 15 E-societoj kun 780 membroj. Dum la kuranta lernojaro tie funkcias 30 E-kursoj kun 620 partoprenantoj. La organizaĵo efektivas sukcese diversajn iniciatojn: internaciajn

E-kursojn en Pisanica, la ripozojn „Ora Feriado“ aŭtune kaj „Vintrajn E-Semajnojn“ en Pamporovo, someran aviadil-buslinion „Esperanto“ inter Bulgario kaj Pollando, ekskursojn enlandajn kaj eksterlandajn, renkontiĝojn ktp.

Tiu ĉi utila laboro trovis altan pritakson de la popola registaro kaj ĝi dispenigis sumo de 500 000 levojn por konstruo de domo kursejo en v. Pisanica, je 6 km de Smoljan. La konstruaĵo okupas 720 m² da areo. Ĝi estas moderna, 5-etaĝa, kun vastaj aŭditorioj, kabinetoj, biblioteko, legejoj, klasĉambroj.

LUMO SUR IOM NEBULITAN EPIZODON

En 1927 j. la rusa E-pioniro Vladimir Aleksandroviĉ Gernet (1870—1929) estis intervjuita lige kun la 40-jara datreveno de Esperanto. En sia intervjuo Gernet priskribis la kondiĉojn, en kiuj laboris la unuaj esperantistoj en Rusio. Interalie li diris: „Ankaŭ grandajn malfacilaĵojn ni devis venki, ricevante librojn kaj ĵurnalojn el eksterlando. Mi memoras unu lernolibron de bulgara esperantisto Bogdanov. Sur ĝia ruĝa kovrilo estis presita ĉikletele la vorto REVOLUCIO. Ricevo de tia speco libro estis sufiĉa, por ke „ohranka“* (. . .) havu „rajton“ ekzili la ricevinton en Siberion. Kaj la ricevinto estis d-ro Zamenhof. Dum kelkaj semajnoj ni timis pri lia sorto, atendante lian areston“.¹

Do estas nek hazarde, nek surprize, ke tiu ĉi tipa epizodo eniris la biografion de Zamenhof² kaj la historion de nia movado.

Sed laŭ mi V. Gernet ne rememoras bone pri ĉio, parolas ĝeneralige, ne fiksas ĝuste, kiam kaj kie tio okazis. Kompreneble, ĉetiaj cirkonstancoj — dum intervjuo — rapide restarigi tion, kio okazis antaŭ kvardek jaroj, estas afero ne tute facila. Mi opinias, ke en la rememoro de Gernet ekzistas malĝustaĵoj. Tion rimarkis ankaŭ Marjorie Boulton en sia libro pri Zamenhof kaj iom modifis la sencon de Gernet-rememoro, anstataŭante la vortojn „sur ĝia ruĝa kovrilo estis presita dikletele la vorto revolucio“ per la vortoj „sur ĝia kovrilo la vorto revolucio brulis ruĝlittere“. Sed tiu ĉi ŝanĝo nur ŝajne glatigas la kontraŭdiron inter tiu parto de Gernet-rememoro kaj la fakta stato, ĝi erarigas la leganton, ĉar li povas pensi, ke iu cara cenzuristo ruĝe stampis laŭ ruĝlittere skribis la vorton „revolucio“ sur la kovril-

paĝo, indikante per tio, ke la libro estas ribeliga, revolucia, sekve malpermesenda. Ĉu do tiu korekto estas konforma al la historia vero? Kion finfine oni povus diri pri tiuj frazoj?

Ni analizu la disponeblajn faktojn. V. Gernet mencias, ke temas pri bulgara E-lernolibro de M. St. Bogdanov. Tamen en Bulgario ekzistas ekzempleroj de tiu lernolibro, kaj krom tio eĉ el bibliografiaj fontoj oni povas konstati, ke la timiga por la carisma reĝimo en Rusio vorto „revolucio“ mankas en la titolo. El tio sekvas, ke Gernet enlasis eraron ne en la detalan, sed en la esencan parton de sia eldiro.

Esplorante la libran heredaĵon de M. Bogdanov el la jaroj 1887—1895 mi konstatis, ke temas ne pri la unua bulgara E-lernolibro³ de 1890, enlistigita en la „Nomaro de l' verkoj pri la internacia lingvo Esperanto“⁴ sub n-ro 34, sed pri tute alia verko, enskribita en la sama listo kun mallongigita titolo sub n-ro 69. La kompleta titolo de tiu ĉi verko estas: „VSEMIRNO MEĈTANIE i Bălgarskata pravopisna REVOLJUCIJA“, bulgarlingve eldonita en Sofio komence de 1894. La libro ampleksas du apartajn, tute memstarajn verkojn de Bogdanov. La unua estas longa priesperanta artikolo, kristaliĝinta en la titolo de la libro kiel „Vsemirno meĉtanie“ (Tutmonda revo), kaj la dua estas mallonga, sed verva pledo por enkonduko de fonetika skribo en la bulgaran lingvon; ĝia memstara titolo estas: „Bălgarskata pravopisna REVOLJUCIJA“ (La bulgara ortografia reformo). Ĉi tie ni devas atentigi, ke la bulgara vorto „revoljucija“


* *Ohranka* — t. e. la sekreta polico.

kinosalono, dormoĉambroj kun po 2 aŭ 3 litoj, memstaraj sanitaraj-higienaj ejoj, kuirejo, sporta halo ka. La domo estos ekipita per ĉio necesa por instruado laŭ la modernaj postuloj kaj disponigos plenan pensionon al la partoprenantoj en la kursoj. Ŝajne ĝi estos la unua en la mondo tiaspeca kursejo de Esperanto. En ĝi oni lernos la lingvon kaj prepa-

ros sin por kursgvidantoj kaj E-instruistoj. La laboro en la domo daŭros seninterrompe tutan jaron. Krom la kursoj tie okazos diversspecaj renkontiĝoj, seminarioj, simpozioj ka. organizataj de la Distrikta kaj Centra Estraroj de BEA, de UEA, de aliaj internaciaj E-organizoj kaj institucioj.

La konstruado de la domo komenciĝis antaŭ unu jaro kaj impete progresas. Laŭplane ĉio devas esti finita ĝis la 30 de junio 1978. Oni antaŭvidas solenan inaŭguron tuj post UK de Esperanto en Varna, tiel ke ĝin partoprenu ankaŭ multaj gastoj el eksterlando. „Tio estas kuraĝiga novaĵo, — skribis d-ro Tonkin, prezidanto de UEA, en letero de oktobro 1976. — La starigo de tiu domo estos granda evento ne nur por vialanda E-agado, sed ĝi estos utila ĝenerale por la E-movado.

Vasil Mitovski



estas uzita kiel sinonimo de reformego, radikala ŝanĝo. Ĝi kvazaŭ estas superlativo de la vorto reformo, se oni povas tiel esprimi sin.

Per tiu signifo de la vorto „revolucio“ kaj per ties pli elstara preso ol iuj aliaj vortoj de la sama titolo (per pli grandaj kaj pli dikaj literoj) M. Bogdanov deziras reliefi pli okulfrappe la gravecon de la tiom necesa radikala ortografia reformo en la bulgara lingvo. Ambaŭ artikoloj „VSEMIRNO MEĈTANIE“ kaj „Bâlgarskata pravopisna REVOLJUCIJA“ estas kunigitaj en la titolo de la edono per konjunkcio „i“ (kaj).

Tiu ĉi libro estas detale menciita en la nurnberga „Esperantisto“ (febr. 1894) kaj en la bibliografio de Petro Stojan. Feliĉe, ni havis bonŝancon antaŭ ne longe trovi ekzempleron de tiu ĉi konsiderata ĝis nun kiel malaperinta verko⁵. Ĝi estos objekto de plua detala studado kaj kompara esploro.

Nun ni okupiĝu iomete pri la problemoj, kiam V. Gernet fariĝis esperantisto. Ties solvo eventuale povus esti utila por la fina konkludo. A. Verŝinin verve defendas la tezon, ke V. Gernet ne nur estis esperantisto, sed eĉ ludis gvidan rolon, grupiginte ĉirkaŭ si aliajn esperantistojn kaj fondinte, jam en septembro 1889, Esperantistan Societon en Odeŝo⁶. A. Holzhaus asertas, ke Gernet-esperantistiĝo okazis en la jaro 1890⁷. Tamen ankaŭ tio estas nur supozo nepruvita kaj dubinda.

V. Gernet estas enlistigita en „Adresaro“ XVII (sub n-ro 3794). Tiu ampleksas la adresojn de la aliĝintoj al Esperanto inter la 1-a de oktobro 1895 ĝis la fino de 1896. Tamen... tio estas la oficiala aliĝo de V. Gernet. Aliaj argumentoj pruvas, ke li eksplode ekbrilis sur la verda firmamento jam en 1894 j. Tiam li abonis „Esperantiston“ kaj la „Bibliotekon de la lingvo internacia Esperanto“, partoprenis la faman voĉdonon (1894) pri ŝanĝoj en Espe-

ranto, verkis ruslingve priesperantan artikolon por iu gazeto en Odeŝo kaj rekte korespondis kun L. Zamenhof en Grodno, Rusio.

A. Ĉajkovskaja⁸ ankaŭ kontribuas tiurilate. Rakontante pri la unua neoficiala kunveno de la esperantistoj en Odeŝo, ŝi mencias ok nomojn de esperantistoj, kiuj klopodis pri starigo de oficiale sankciita filio de la Peterburga Esperantista Societo „Espero“. Inter tiuj ok nomoj estas ankaŭ la nomo de V. Gernet. Pri la ceteraj, sep personoj oni trovas abundajn materialojn (abonoj, varbado, verkado, tradukado ktp), pri Gernet tamen oni nenion similan trovas antaŭ la jaro 1894. Efektive, oni ne rajtas neglekti tion.

Do V. Gernet ekaktivis por Esperanto proksimume ekde tiu sama momento, kiam aperis la libro de Bogdanov „VSEMIRNO MEĈTANIE i Bâlgarskata pravopisna REVOLJUCIJA“ (1894). Jam ne devas ekzisti eĉ ombro de dubo, ke en la rememoro de Gernet, dum la menciita intervjuo, temas ĝuste pri tiu ĉi libro.

Definitivajn argumentojn pri la solvo de la starigita problemoj alportis la retrovita ekzemplero de la Bogdanov-libro el 1894.

La lernolibro de Bogdanov (1890) neniam havis la kutimajn kovrilojn. Tuj post la presado la korpo de la ekzempleroj estis enkar-toniĝita. Tiuj „fremdaj“ kovriloj ne surhavis la presitan titolpaĝan tekston de la lernilo. Kontraŭe, la libro de Bogdanov de 1894 j. havas originajn kovrilojn kaj ili estas ruĝaj. Bonvolu atenti, ke Gernet parolas pri la „ruĝa kovrilo“ de la libro.

Mi traktis ĉi tie elfunde konatan epizodon el la historio de nia movado por forpeli la nebulon, ekzistantan ĉirkaŭ ĝi jam dum kvin jardekoj (ekde 1927). Ŝajnas al mi, ke ekde nun plifortiĝas ankaŭ la klareco ĉirkaŭ la pionira E-agado de M. St. Bogdanov en Bulgario antaŭ 90 jaroj.

Bibliografio

1. Kvardek jaroj (1887—1927), eldono de SAT, 1927, p. 18—19.

2. M. Boulton, Zamenhof, aŭtoro de Esperanto, 1962, p. 85.

3. M. S. Bogdanov, Plena lernolibro por mondlingvo de d-ro Zamenhof, Sofio, 1890.

4. Esperantisto, jk. V, n-ro 9(57), de sept. 1894, p. 142—144.

5. (M. St. Bogdanov), VSEMIRNO MEĈ-

TANIE i Bâlgarskata pravopisna REVOLJUCIJA, Sofio, 1894.

6. Nuntempa Bulgario, Sofio, 1959, n-ro 4, p. 44; 1961, n-ro 4, p. 41—44.

7. A. Holzhaus, Doktoro kaj lingvo Esperanto, Helsinko, 1963, p. 252.

8. Esperantisto, jk. V, n-ro 7(55), de julio 1894, p. 103.

OKAMARTAN SALUTON AL LA LEGANTINOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“, KIUJ BATALAS POR AMIKECO KAJ KUNLABORO INTER LA POPOLOJ, POR PACO KAJ FELIĈA VIVO SUR LA TERO!



HEROA PASINTECO

Hrima

KREDO ŜPRUCIS EL LIAJ OKULOJ

Kiel vera internaciisto Stojan Mi-
hajlov interesiĝis pri Esperanto jam
en la fino de la dudekaj jaroj. Li
perfektiĝis en la lingvo kaj komencis
viglan korespondadon kun [esperan-



tistoj el Italio, Belgio, Nederlando ka.
Tiel Stojan (nomata de ĉiuj Stojanĉjo)
informiĝis pri tio, kio okazas en okci-
dentaj landoj suferantaj pro granda
financa krizo. Siaflanke li priskribis
la vivkondiĉojn en nia lando, kiun
tiutempe oni nomis „lando de pendi-
giloj“ pro la furiozanta en ĝi faŝista
teroro. Fragmentoj el la leteroj de
Stojan aperis en la progresema gaze-
taro de la okcidentaj landoj.

Li estis elokventa propagandanto.
Ĉion, kion li ricevis el fremdlando,
li diskonigis al siaj konatoj kaj ko-
legoj, tiel pruvante la utilon de la

Internacia Lingvo por la laborista klaso.

Stojan posedis naturan talenton de
artisto. Per sia baritono li verve de-
klamis kaj kantis revoluciajn kaj
popolajn kantojn. Aparte li preferis la
rusajn, tradukitajn en Esperanton.

Volgo, Volgo, ho patrino,
vi rivero de Rusland',
ja ne vidis vi donacon
de kozak' el Dona land'.

Li tre ŝatis ĉi kanton kaj ankaŭ
jenan:

Tiru forte, tiru forte !
Kaj refoje : tiru forte
Kiel betultrunko klinu vin,
kiel la betul' gracia !
Ej uhnem, ej uhnem. . .

Stojan sciis parkere dekojn da so-
vetaj kantoj en rusa lingvo kaj Espe-
ranto, sed tiutempe en nia lando ilia
publika kantado estis severe malper-
mesita per speciala leĝo.

Kvankam malriĉa, Stojan ne volis
resti malklera kaj faris ĉion eblan por
sia kleriĝo. Fininte privata gimna-
zion en Sofio, li revenis en Plovdiv,
kie estis enoficigita kiel provaktoro
en la urba teatro. Li verkis teatraĵon
kaj proponis ĝin al la direkcio. La
polica cenzuristo tamen ne permesis
ĝian surscenigon, ĉar en ĝi estis pri-
skribitaj socikonfliktoj. Por similaj ver-
koj la fifama Leĝo por Defendo de la Ŝta-
to antaŭvidis sep jarojn da mallibereco.

Jam en sia knaba aĝo, post la Unua
Mondmilito, Stojan lernis de pli aĝaj
kamaradoj kompreni la problemojn de la
vivo. En la proleta kvartalo, kie loĝis
lia familio, estis kamaradoj kun revolu-
cia sperto, kiuj kuraĝe batalis kontraŭ
la sociaj parazitoj-ekspluatistoj. Ta-
men plej multe li lernis de sia patro
Stefan — adepto de la makedonaj
revoluciuloj Goce Delĉev kaj Jane
Sandanski. Lia „instruisto“ pri komuni-
simo estis ankaŭ la onklo Hristo Poli-
merov, unu el la gvidantoj de la La-
borista Partio en Asenovgrad. Dank'
al ili Stojan eksciis, ke en la mondo
ekzistas lando, kie regas laboristoj,
kaj kie la vivo konstante pliboniĝas.
Tio estas la soveta lando. Por havi



similan sociordon en nia lando, necesas kuraĝa batalo sub gvido de revolucia partio.

Baldaŭ Stojan montris siajn bonegajn kvalitojn de organizanto kaj estis elektita en la distrikta gvidorgano de la Laborista Junulara Unuiĝo (RMS). Tiel li eniris la medion de junaj komunistoj, kiuj poste fariĝis gvidantoj de distrikta kaj nacia skalo: Jordanka Nikolova, Saŝo Dimitrov, Nikola Balkanĝiev, Ĥristo Koĉev, Ivan Armin, Rajĉo Kirkov — la lastaj tri ardaĵ esperantistoj. Ili ĉiuj havis la samajn idealojn kiel li — forigi la ekspluatadon de homo al homo, detronigi la senkronajn reĝojn, kies fabrikoj kaj entreprenoj similis araneaĵon, kie oni malrapide, sed certe elsuĉadis la vivfortojn de la laboristoj-sklavoj.

En la komenco de 1934 j. Stojan estis altirita en la distrikta propaganda komisiono de la Laborista Partio, kies membro estis ankaŭ mi. Ni kunsidis en diversaj domoj, plej ofte en la domo de Balkanĝiev, kiu estis la komisionestro. En nia laborplano antaŭstaris celebroy de tri gravaj datrevenoj: la tago de Lenin, Libkneht kaj Ljuksemburg (la tri „L“); la 17-jariĝo de la Ruĝa Armeo; la 63-a datreveno de la Pariza Komuno.

Mi, ankoraŭ nesperta en la arto prepari referaĵon, legis la referaĵojn de Stojan por lerni de li. En la kunveno, dediĉita al V. I. Lenin, Karlo Libkneht kaj Roza Ljuksemburg, li koncentris la atenton de la aŭskultantoj al la situacio en Germanio, kie furiozis la Hitler-diktaturo. Denove subpremas la germanan popolon imperiistoj kaj generaloj, kontraŭ kiuj batalis Libkneht kaj Ljuksemburg. Ili murdas komunistojn kaj socialdemokratojn kaj preparas novan militon ĉefe kontraŭ USSR. Pri Lenin Stojan diris, ke ĉiu revoluciulo, kiu serioze volas batali kontraŭ la klasa malamiko, devas studi liajn verkojn. Li rekomendis „Kio estas la popolamiko kaj kiel ili batalas kontraŭ la socialdemokratoj“, „Per kio komenci?“, „Kion fari?“,

„Kritikaj notoj pri la nacia demando“, „Du taktikoj. . .“ ka. Pri ĉiu verko li faris koncizan komenton.

Pri la legendeca Ruĝa Armeo, kiu forpuŝis la intervenon de dekkvar imperiismaj ŝtatoj kaj frakasis la internan kontraŭrevolucion, li diris:

— Nia popolo neniam direktos armilojn kontraŭ la nepoj de niaj liberigintoj.

Mi aŭdis lin same verve paroli pri la Pariza Komuno, pri ĝiaj honestaj kaj kuraĝaj gvidantoj Varlen, Frankel, Potie, Delekljuz, Dombrovski, Lavrovka. El liaj okuloj ŝprucis firma kredo je la estonta venko de la bulgara komuno.

En la aŭtuno de 1935 Stojan havis eblecon tralegi la raporton de Georgi Dimitrov, faritan antaŭ la Sepa Kongreso de Kominternio, kaj kun kredo kaj entuziasmo eklaboris por la nova taktiko de la komunistaj partioj.

Kiam en 1936 j. ribelis generalo Franko en Hispanio kaj la Kominternio alvokis pri volontuloj, kiuj helpu la Hispanan Respublikon, la hejmo de Stojan bonvenigis ĉiun, kiu deziris veturi por batali kontraŭ la hispana faŝismo. Li zorgis pri pasportoj kaj veturmono.

Sed lia sindona antifaŝista agado ne restis sekreto por la spionoj. Oni arestis Stojan kaj en la kelo de la policejo sadistoj frakasis lin. Tamen malgraŭ la teruraj torturoj li nenion konfesis, liaj lipoj restis sigelitaj de nerompebla fideleco al la Partio, al la popolo.

Multnombraj amikoj kaj samideanoj de Stojan kolektiĝis antaŭ lia domo por akompani la kadavron. La regantoj tamen timis eĉ la mortintan komuniston. Rajdpolicanoj akompanis la funebran procesion ĝis la tombo.

Por siaj multaj diverslandaj korespondantoj tamen Stojan ankoraŭ vivis. Al lia adreso venadis leteroj. Iuj demandis, kial li silentas. Belga esperantisto sendis al li ilustritan poŝtkarton kun sola frazo: „Kamarado, vivu la libero!“ Ho ve, ili ne sciis, ke la mano, kiu skribis belajn kaj enhavoriĉajn leterojn, jam estas rigida. . .

ESPERANTO EN LIBRO PRI SEVLIEVO KAJ ĜIA REGIONO

Esperanto en Sevlievo kaj en la regiono de Sevlievo estas tre populara. Antaŭ la 9-a de septembro 1944 — la tago de la socialisma revolucio en Bulgario, la E-movado tie ĉi estis tre forta kaj Sevlievo plenrajte estis nomata „fortikaĵo de Esperanto“ en nia lando. Tio ĉi ne estis hazarda. En Bulgario la E-movado intime ligiĝis kun la progresemaj movadoj, kun la batalo kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo, organizita kaj gvidata de la Bulgara Komunista Partio. Kaj Sevlievo kaj ĝia regiono estis konataj per sia alta revolucia spirito. Tie ĉi la progresemaj ideoj ĉiam trafis plej fekundajn grundon. En la perarmila batalo kontraŭ la faŝismo (1941—1944) pereis 8 esperantistoj el Sevlievo kaj ĝia regiono.¹ Tial la vorto Esperanto estas plurloke menciita en la libro „Sevlievo kaj la regiono de Sevlievo“², volumo 2, eldonita okaze de la 100-jariĝo de popola legejo „Rosica-Razvitiie“ en Sevlievo, celebrata en 1970.

La libro reprezentas kolekton de 22 artikoloj, sciencaj komunikaĵoj kaj rememoroj pri la historio de Sevlievo kaj ĝia regiono, pri la historio de la legejo en Sevlievo, pri la eduka agado de la unuaj socialistoj en tiu ĉi urbo, pri la muzika agado tie, pri la poligrafia, eldona kaj ĵurnalista agado en Sevlievo, pri la poetoj, verkistoj kaj elstaraj kulturagantoj de la urbo kaj ĝia regiono. Estas tre bedaŭrinde, ke la kompilintoj de la librone konsideris necesa enmeti artikolon pri la E-movado en Sevlievo kiel parto de la kultura agado en tiu ĉi urbo. La libro prezentas intereson ne nur por la homoj, ligitaj iumaniere kun Sevlievo kaj ĝia regiono, sed ankaŭ por la ĝenerala publiko.

Mi montras la lokojn en la libro, kie Esperanto aŭ momentoj el la E-movado estas tuŝitaj lige kun la agado de apartaj personoj aŭ organizaĵoj.

En la artikolo „Sevlievo — poligrafia, eldonista kaj ĵurnalista centro“, en la ĉapitro pri la presejo kaj eldonejo „Bratstvo“ (Frateco) la aŭtoro informas, ke en 1927 komenciĝis la eldonado de la esperantlingva gazeto „Frateco“ kaj de E-biblioteko (p. 287), ke ekde 1922 ĝis 1948 la eldonejo „Bratstvo“ eldonis la E-lernolibron de ADA 1945, la E-lernolibron de Z. Zahariev (1940 kaj 1945 j.), la Plenan Esperanto-Bulgaran Vortaron de Atanas Ni-

¹ Vidu la liston de pereintaj en la kontraŭfaŝisma batalo bulgaraj esperantistoj, publikigita en „Bulgara Esperantisto“, 11/1974.

² „Sevlievo i sevlievskijat kraj“, eldonejo de la Patrolanda Fronto, Sofia, 1970, paĝoj 344.

kolov (1939 j.) kaj la Plenan Bulgara-Esperantan Vortaron de la sama aŭtoro (1943 j.), la libron „Historio de Esperanto“ de Simeon Hesapčiev (1940, 1941 j.).

En la supremenciita artikolo la ĉapitro „La ĵurnalistiko en Sevlievo“ informas, ke apartaj numeroj de ĵurnalo „Vâzhod“ (Supreniro) — periodaĵo pri kulturo, literaturo kaj arto, redaktata de komitato de lernantoj el la gimnazio, kiu aperadis de 1938 ĝis 1940, estis dediĉitaj al Esperanto (p. 290).

La artikolo „Verkistoj kaj poetoj el Sevlievo kaj la regiono de Sevlievo“ de Stefan Atanasov donas detalan informon pri la poeto Dočo Stanev (1883—1943). Li estis naskita en Trojan, sed en sia junaĝo forlasis tiun urbon kaj enmigris Sevlievon. Fininte nur la sesan klason de elementa lernejo, D. Stanev ĝis la lastaj jaroj de sia vivo ne ellasis la kudrilon kiel kudristo, laborante tuttage, nokte kaj eĉ dum ripoztagoj. Kaj tamen li trovis tempon por spiritaĵoj okupoj. Lige kun lia E-agado oni skribas en la libro: „Dotita de la naturo per vigla menso, li ne ŝparas fortojn kaj ellernas perfekte la lingvon Esperanto. Post la Unua Mondmilito la scipovon de tiu ĉi lingvo D. Stanev utiligas por defendi sian patrolandon per publikigo de kelkaj grandaj artikoloj en fremdlandaj E-gazetoj. En francaj kaj japanaj E-revuoj li aperigas originalajn E-versaĵojn“ (paĝoj 232, 233).

Lige kun la verkaro kaj agado de Sava Kalimenov (naskita en 1901), oni notas, ke li estis redaktoro de la semajna gazeto „Frateco“ (p. 238).

Oni parolas ankaŭ pri la poeto kaj favorulo de la laborista kaj progresema lerneja junularo Stefan Penkov Stojanov — Viŝrenski (1917—1939), arda esperantisto, aŭtoro de versaĵoj kaj artikoloj, en kiuj li montris la vojon de batalo kontraŭ la kapitalisma ekspluatado. Oni mencias, ke dum la 25-a kongreso de BEA la someron de 1938 en Sevlievo bando de faŝistoj kruele batjis lin, rezulte de kio li malsaniĝis pro tuberkulozo kaj la 20-an de aprilo 1939 mortis (paĝoj 245, 246).

Inter la verkistoj kaj poetoj estas menciita ankaŭ Marin C. Bălgarenski (1913—1962) el vilaĝo Mleĉevo kun la pseŭdonimoj Rinma, Meteor, Evtimij ka., kiu publikigis versaĵojn bulgarlingve kaj en Esperantaj revuoj (p. 256 kaj 257).

Mi uzas la okazon por direkti alvokon al la esperantistoj el Sevlievo verki la historion de la E-movado en sia urbo, kiu estos tre intrua por la junaj generacioj.

Dimlito Haĝiev



Kursano petas de mi adresojn de eksterlandaj korespondemuloj. Mi donas al li freŝajn numerojn kaj lastjarajn kolektojn de «Heroldo», «Esperanto», «Bulgara Esperantisto», «Der Esperantist», «Paco», «Hungara Vivo» kaj de aliaj aboneblaj revuoj. La lernanto komencas ĉasi korespondamikojn. Per multaj leteroj kaj bildkartoj li bombardas adresojn, indikitajn en la revuo. Li ŝvite elpafas kelkajn dekojn da leteroj, sed multe — senrezulte. La statistiko montras, ke proksimume 50—90% de la adresitoj pro diversaj objektivaj aŭ subjektivaj kaŭzoj ne povas aŭ ne bonvolas respondi eĉ per unu poŝtkarto. Se la lernanto estas persista, li mem eksendas anoncojn pri korespondado al revuoj. Tiu rimedo donas pli bonan rezulton.

Nun ne li serĉas, sed oni serĉas lin. La praktiko tamen pruvas, ke eĉ tiu vojo ne ĉiam liveras sufiĉan kvanton da taŭgaj korespondantoj.

Proksimuma normo de korespondaj ligoj por novico devus esti dek-leteraj rilatoj kun eksterlando. Ĉe tia nombro la novico relative ofte ricevas leterojn kaj devas konvene reagi. La korespondo iĝas por li utila kaj interesa okupo. Korespondante oni: 1) ricevas plezuron esti perleteran amikecon kun malproksimaj eksterlandanoj; 2) perfektigas sian konon de la lingvo; 3) ekscias multon interesan pri foraj landoj; 4) povas plenumi patriotan devon, rakontante en siaj leteroj pri pluraj flankoj de la patria vivo; 5) helpe de leteroj povas interŝanĝi valorajn objektojn; 6) starigas amikan kontakton, kiu povus helpi dum eksterlanda vojaĝo; 7) povas akiri bezonatajn fakajn informojn; 8) konvinkiĝas, ke Esperanto estas praktike uzebla; 9) edukiĝas en spirito de internacia amikeco kaj pacamo.

Konklude: la E-korespondado estas forta stimulo por lerni Esperanton. La diritaj veraĵoj estas ĝenerale konataj aksiomoj, tamen pro ilia graveco ne estas superflue ilin rememorigi.

En la E-mondo sur la tuta tero lernas la Internacian Lingvon ĉiujare multmiloj da homoj. Se la instruaferoj estas aranĝitaj modele, ĉiuj lernantoj devus internacie korespondi. Tio garantias, ke eklerninto finlernos Esperanton kaj restos en la Movado, ĉar lin ligo al ĝi interesaj internaciaj leterkontaktoj.

Cu tian kvanton da anoncoj povus disponigi al novicoj la E-gazetaro? Certe, ne. Por ĉiu jaro tia kvanto da korespondanoncoj ne estas aperigebla. Do, evidente, ekzistas problemoj: kiel oni povus rapide, oportune kaj malmultekoste (eĉ estus dezirinde senpage) trovi sufiĉan kvanton da korespondantoj por novicoj kaj ĝenerale por ĉiuj ŝatantoj de internaciaj leterkontaktoj?

La problemon eblus solvi jene.

Ĉiu landa organizaĵo devus aranĝi landan, apartan korespondan servon, pri kiu respondus speciala komisiito aŭ komisiono de korespondaj perantoj. La svatosimila laboro de la koresponda servo estas temporaba, sed interesa, utiliga, dankoporta kaj diskoniga por korespondestro, tial oni facile povus trovi kandidatojn por tiu laboro. Ĝin oni facile povus aranĝi tre simple: la komisiito regule kolektas de sialandaj societaj respondeculoj aŭ instruistoj informojn pri korespondaj bezonoj. Konforme al la ricevita sciigoj li kompilas longajn listojn de korespondemuloj por definita tempo, multobligas aŭ presigas kaj dissendas ilin laŭ mendoj de eksterlandanoj aŭ enlandanoj, kontraŭ difinita pago, mona aŭ aĵa. Se ekestas transpaga problemoj, eblas ĝin solvi per interŝanĝo de korespondaj listoj inter diversaj landoj. Ĉiu listo de korespondemuloj devus havi adresojn de kelkaj centoj da personoj. La listojn necesus regule kompletigi, depende de venantaj novaj adresoj. Se korespondemulo, jam enskribita en listo, ne konfirmus post unu jaro sian pluan emon korespondi, oni devas forigi lian adreson el la listo.

Ricevinte grandan nombron da adresoj kun ĉiuj necesaj indikoj pri aĝo, profesio, sekso, intereso ktp, oni facile povus trovi bezonatan kvanton da taŭgaj korespondantoj. Kaj risko vane sendi leteron konsiderinde malpliigus. Ankaŭ gravas la cirkonstanco, ke la korespondestro ŝparas multan tempon, ne estante devigata elskribadi bezonatajn adresojn, sed povante sendi pretan liston.

Estus tre celkonforme, se ĉiu E-societo (klubo) abonus korespondajn foliojn same kiel ĝi abonas revuojn. Ĉi-okaze novicoj sen ajna klopodo povus tuj trovi bezonatajn adresojn.

En ĉiu listo de korespond-adresoj devus troviĝi averto, ke persono, kiu sendis leteron laŭ adreso, prenita el koresponda listo, rajtas plendi al la korespondestro pri nerespondo al lia unua letero. Post tia plendo la nerespondinto enviciĝas por puno sur «nigran liston», kies membroj ne rajtas estonte uzi la korespondan servon.

Tia korespond-organiza laboro ja estis kaj estas kelkloke farata, sed ne ĉie, ne konstante, ne oficiale, ne sur sufiĉe alta nivelo, nesufiĉe alirebla.

Ekzistas ĉe UEA mondscale koresponda servo, kiun konsciencie estras meritplena fraŭlino G. Hueter (12 rue des Jacobins, Clermont-Ferrand, Puy de-Dôme, 63000 Francio), sed unu persono fizike ne povas kontentigi la korespondemulojn de la tuta E-mondo. Krome, por ricevi rektan respondon de f-ino Hueter, necesas sendi al ŝi respondkuponon, kiun maleblas akiri en poŝtejoj de pluraj landoj.

(Sur p. 14)

● 140 hungaraj parlamentanoj direktis proponon al la prezidanto de la parlamenta komisiono pri kulturo, petante starigon de aparta instanco, kiu studu la eblecojn por adopto de komuna internacia lingvo. Laŭ la propono, tiu nova instanco konsistu el parlamentanoj kaj fakuloj pri la monda lingvo-problemo.

● La Hispana Socialista Laborista Partio unuanime aprobis jenan rezolucion: „Por ke estu vera interkompreno kaj frateco inter la laboristaro, oni bezonas, ke la homoj povu rilati senpere. Tial oni konsilas, ke ĉiuj socialistaj partioj de la tutmondo adoptu Esperanton por siaj internaciaj rilatoj kiel lingvon de la laborista klaso.“

● Laŭ studo de d-ro T. Karlevaro, markizo Lui d'ŝo Bofron (Louis de Beaufront) (1855—1935), siatempe unu el la plej entuziasmaj adeptoj de Esperanto kaj poste „apostolo“ de Ido, estis nek markizo, nek de Beaufront. Lia vera nomo estis Lui Joŝen Ševro (Louis-Eugène Chevreux).

● La 21. 10. 1976 la unua programo de la ĉeĥa televido elsendis 8-minutan koloran raportaĵon pri Esperanto. En la programo, elsendita je la 8-a horo vespere, parolis d-ro Jermar, V. Kvasniĉkova kaj Z. Křimsky.

● La mongola E-Unuiĝo (p. k. 733, Ulan-Bator) havas nun 40 membrojn kaj preparas eldonon de Esperanta-mongola vortaro.

● La 18. 12. 1976 okazis proksime de Ĉjuriĥ (Zürich), Svisio, la baptado kaj inaŭguro de varmaera balono „Esperanto“. Ĝi estas konstruita en Usono, la enhavo estas 1600 m³, la diametro — 15 m kaj la alteco 18 m. La materialo estas nilono miksitita kun poliuretano, tial nebruligebla. Post baptiĝo la balono leviĝis la unuan fojon kun baptado-onklino H. Liechti kaj piloto B. Rohr.

● La mondkonata hotel-ĉeno Holiday Inn (150 hoteloj) komencis utiligi Esperanton en siaj prospektoj kune kun la angla, franca, germana kaj japana. En FGR jam aperis en centmil ekzempleroj du tiaj faldfolioj: unu pri la hotelo en Viernheim-Mannheim, la alia pri la hotelo en Frankfurt.

El „Informilo“ de la Internacia E-Muzeo en Vieno, n-ro 1/1977

Se ĉiuj landaj organizaĵoj starigus aranĝitan laŭ la supra skemo korespondan servon, ili per tio donus fortan puŝon al progresigo de la monda E-movado. Dank' al intensa internacia korespondado ni altgrade evitus la plagon, kiun prezentas la forirado de novicoj, varbitaj, sed ne povintaj praktike utiligi Esperanton jam en laŭeble frua lernostadio.

En decembro 1976 Sergej Krajinov, sciencisto-agronomo kaj E-veterano (vidu en „Bulgara Esperantisto“, n-ro 12/1976, p. 12) restis longtempe en la regiono de Stavropol kaj en Kabardina-Balkara Aŭtonoma Soveta Socialisma Respubliko en Kaŭkazo.

Laŭ liaj informoj la Kabardina-Balkara Eksperimenta Stacio pri Ĝardenkulturado kaj la regiona administracio de la forstomastromo havas eblecon disponigi certan kvanton de semoj kaj eble ankaŭ arbidojn de hipofeo por patrinparceloj kaj kolektoj, ankaŭ doni organizan helpon kaj konsilojn. Interalie S. Krajinov vizitis tie la filion de la societo „USSR — Bulgario“ kaj lekciis. Kvar urboj en Stavropol-regiono estas ĝemelaj al bulgaraj urboj. Ili, samkiel kelkaj institutoj kaj organizaĵoj el nordaj regionoj de USSR, povus disponigi arbidojn de hipofeo por Bulgario.

ALVOKO EL GDR

Okaze de la 60-a datreveno de la Granda Socialisma Oktobra Revolucio la esperantistoj el Karl-Marx-Stadt (GDR) aranĝos internacian letervesperon kun migranta ekspozicio. Ni ege petas ĉiujn geesperantistojn kaj gekamaradojn el la tuta mondo helpi al ni per salutskribaĵoj, bildkartoĵoj kun Lenin-poŝtmarkoj kaj ekstraj poŝtmarkoj pri la Ruĝa Oktobro mem, per Lenin-afiŝoj kaj afiŝoj pri aliaj eminentaj gvidantoj de la klaskonscia laboristaro, ankaŭ per ĉia konvena materialo. Nia letervespero kaj la migranta ekspozicio okazos sub la devizo: „Mondskalan amikecon al la granda Sovetunio“

La esperantistojn el la kapitalismaj landoj ni petas sendi al ni rezoluciojn de simpatio kaj alian konvenan por nia celo materialon. De ili ni volonte akceptus opiniojn pri la socialismo, pri la socialismaj landoj ĝenerale kaj pri la ŝanĝoj en iliaj propraj landoj post la Ruĝa Oktobro.

Kroma celo de nia aranĝo estas la plifirmigo kaj pliprofundigo de la sentoj kaj pensoj pri la internacia solidareco kaj proleta internaciismo. Ĉio ĉi helpas al ni en la disvastigo de Esperanto.

Respondo — garantiita! Al ĉiuj subtenantoj anticipan dankon! Kiu deziras havi nian broŝuron „Pri la historio de la iama laborista E-movado en niaj urbo kaj distrikto“, bonvolu mernii tion speciale. La broŝuro estas presita germanlingve.

Karaj geesperantistoj kaj gekamaradoj! La Ruĝa Oktobro malfermis novan epokon por la homaro, tial ĝia jubileo estas eksterordinara!

Bonvolu sendi ĉion laŭ jena adreso: Alfred Müller, Karl-Liebknecht-Str. 47, 90 Karl-Marx-Stadt, GDR.



NE TIEL, SED TIEL ĈI !* (IV)

Bona stilo estas klara

Deviga vortordo:

En iu Esperanto-grupo trafis nin jenaj vortoj, skribitaj sur nigra tabulo: „Ĉi tie oni nur parolu Esperanton.“

— Ĉu ne estas permesite kanti tie ĉi? — mi demandis la prezidanton, supozante, ke kantado eble ĝenu la najbarojn.

— Ni certe rajtas kanti en nia kunvenejo, — li respondis, — kial ne?

Sed tiu frazo kaŭzis miskomprenon pro la neĝusta loko de la vorto „nur“. Per la frazo oni volis diri: „Ĉi tie oni parolu nur Esperanton“.

Vere, en ĝenerala senco la vortordo en Esperanto estas libera, sed tio ne signifas, ke oni rajtas aranĝi la vortojn tute arbitre. Ekz. la vortoj **ankaŭ**, **ankoraŭ**, **eĉ**, **ja**, **nur**, ne kaj kelkaj aliaj staru antaŭ la vortoj aŭ la vortgrupo, al kiu ili rilatas. De tia loko dependas — kiel ni jam konstatis — la signifo de la frazo. *Ekzemploj:*

A

Ne tiel. . .

1. La najbaroj ne sin okupu pri la vizito.
(Do: ili okupu aliajn personojn pri la vizito, ne sin).

2. Ne tion forgesu! (Do: forgesu ion alian, ne tion!)

3. Vi ne tion faru! (Do: kion mi faru?)

4. Mia filo ankaŭ ŝin konas. (Kiun mia filo konas krome?)

5. Mi ankaŭ loĝis tie. (Mi, ekzemple, ne nur laboris tie.)

6. La aliaj ankaŭ vidis ĝin. (La aliaj do ne nur aŭdis ĝin).

B

. . . sed tiel ĉi!

La najbaroj ne okupu sin pri la vizito.

Ne forgesu tion!

Vi ne faru tion!

Ankaŭ mia filo ŝin konas.

Ankaŭ mi loĝis tie.

Ankaŭ la aliaj vidis ĝin.

Nun vi mem povas provi klarigi, kial en la sekvantaj frazoj en kolono **A** la vortoj **almenaŭ**, **ankoraŭ**, **jam**, **eĉ**, **nur**, **tiel**, **ja** kaj aliaj ne staras sur la ĝusta loko, se la tradukinto volis redoni la signifon en kolono **B**:

7. Almenaŭ mi bezonas tri horojn.

8. Oni nur al mi komisiis konduki ŝin tien.

9. Ŝi iros al s-ino V. por petegi ŝin ankoraŭ atendi unu tagon.

10. Ĉu la sinjoro jam tion scias?

11. En Londono oni jam lin konsideris strangulo.

12. Ĉu vi eĉ al mi envias la panon?

13. Neniu eĉ lin vidis eksterdome.

14. Li ja ŝin ne konas.

15. De neniu el la knabinoj ŝi tiel publike estis ofendita.

16. Prefere al mi diru, kien tiu sinjoro iris.

17. Antaŭe mi devas ion diri al vi.

18. (El iu E-organo): Je la oka ĉiuj membroj preskaŭ ĉeestis.

Mi bezonas almenaŭ tri horojn.

Oni komisiis al mi nur konduki ŝin tien.

Ŝi iros al s-ino V. por petegi ŝin atendi ankoraŭ unu tagon.

Ĉu la sinjoro jam scias tion?

Jam en Londono oni lin konsideris strangulo.

Ĉu vi eĉ la panon envias al mi?

Eĉ neniu vidis lin eksterdome.

Li ja ne konas ŝin.

De neniu el la knabinoj ŝi estis publike tiel ofendita.

Prefere diru al mi, kien tiu sinjoro iris.

Mi devas antaŭe diri ion al vi.

Je la oka preskaŭ ĉiuj membroj ĉeestis.

Bona stilo estas logika

Aparte atentu pri la uzo de la participo absoluta:

„Aŭdante tion, ŝi ekploris.“

La uzado de adverbaj participoj en tiaj frazoj estas ĝusta nur se la subjekto de la subpropozicio estas la sama, kiel en la ĉefpropozicio. Ĉi supra frazo do estas korekta: la neces-

* El la konata libro de F. Faulhaber «Ne tiel, sed tiel ĉi!»

primita subjekto de **aŭdante tion** estas la sama kiel en **ŝi ekploris**. **Ŝi** aŭdis kaj **ŝi** ekploris, do same kiel en la plena subpropozicio: Kiam **ŝi** aŭdis tion, **ŝi** ekploris. Konsideru nun jenajn frazojn:

1. Aŭdante tion, larmoj fluus el ŝiaj okuloj.

Tiu frazo ne estas korekta, ĉar la subjekto de **aŭdante** estas **ŝi** (neesprimita), sed la subjekto de **fluus** estas **larmoj**. La frazo do signifas, ke la larmoj aŭdis tion! Sed la aŭtoro volis diri: «Kiam **ŝi** aŭdis tion, larmoj fluus el ŝiaj okuloj.»

2. Kantante «La Espero», la vagonaro forveturis, signifas laŭvorte, ke la vagonaro kantis nian himnon dum sia forveturo. Sed oni volis diri: Dum ni kantis «La Espero», la vagonaro forveturis.

Korektu jenajn frazojn en kolono A kaj komparu vian solvon en kolono B:

A

Ne tiel. . .

1. Trinkinte tason da kafo, la vojaĝo estis daŭrigata.

2. Enfermite mi sendas al vi nian plej novan prospekton.

3. Konante tiujn du faktojn, ŝajnas al mi facile por ĉiu pripensema homo prezenti al si jenan eblon.

4. Promenante, lin kaptis la deziro bani sin.

5. Aŭdante pri la mirindaĵoj, kiujn la soldato rakontis, suno ekbrilis en nia animo.

6. Esplorante iun lingvan fenomenon en Esperanto, la bazo de la esploro devas esti Esperanto mem.

7. Tremegante kvazaŭ de frosto, el li eksplodis senhelpa ploro.

8. Lin kaptis furiozo, legante pri ĉi tiu skandalo.

9. Pensante pri tio, ŝia koro pleniĝis de malĝojo.

10. Pentoplene konfesante sian kulpon, la prokuroro postulis tri semajnojn da mallibero

B

. . . sed tiel ĉi!

Trinkinte tason da kafo, ni daŭrigis la vojaĝon.

Ĉi kune mi sendas al vi nian plej novan prospekton.

Ĉar mi konas tiujn du faktojn, ŝajnas al mi facile por ĉiu pensema homo prezenti al si jenan eblon.

Kiam li promenis, kaptis lin la deziro bani sin, aŭ: Promenante, li ekdeziris bani sin.

Kiam ni aŭdis pri la mirindaĵoj, kiujn la soldato rakontis al ni, ekbrilis suno en nia animo.

Se ni esploras iun lingvan fenomenon en Esperanto, la bazo de la esploro devas esti Esperanto mem, aŭ: Esplorante iun lingvan fenomenon en Esperanto, oni devas bazi sian esploron sur Esperanto mem.

Dum li tremegis kvazaŭ de frosto, el li eksplodis senhelpa ploro.

Kaptis lin furiozo, kiam li legis pri tiu skandalo.

Kiam ŝi pensis pri tio, ŝia koro pleniĝis de malĝojo.

Post kiam la juĝoto pentoplene konfesis sian kulpon, la prokuroro postulis tri semajnojn da mallibero.

Selektis: N. Al.

Verdaj steletoj

A. Loznevoj

LA VOSTO

Fabelo el Ĉukotka

Iras blanka urso laŭ la bordo la kapon klininte. Trian tagnokton ĝi nenion prenis en la buŝo, apenaŭ ĝi kruojn movas.

Rigardas la urso — vulpo sidas sub roko kaj ion manĝas. Haltis la urso.

— Kion vi manĝas, vulpeto? — ĝi demandis.

— La voston, — respondis la vulpo.

— La voston? Kies voston? Mi ion ne komprenas.

— Sed ĉi tie nenio estas komprenenda. Mian voston!

— Ĉu la vian?

— Nu, jes.

— Kaj kiel vi sen vosto vivos?

— Vi estas malsaĝa, — ekridis la vulpo. — La vosto ne estas ŝtono — ĝi kreskos. Kiom ajn vi manĝus ĝin, ĝi denove estos la sama. Tio por mi ne estas la unuan fojon.

— Tiel do, — miris la urso. — Kaj pro kio mi tion ĝis nun tute ne sciis?

— Tial vi malsamas, ke vi ne scias. Nu provu!

Ekĝojis la urso, ke nun ĝi povas manĝi, etendiĝis al la vosto kaj tiel mordis ĝin per la akraj dentoj, ke preskaŭ la tutan deŝiris.

Tiel la urso restis sen vosto.

El la rusa: V. Ĉabarova

LA SPORTISTO FREDERIC JOLIOT-CURIE

Dum la jaroj de sia knaba maturiĝo Frédéric Joliot-Curie (Frederik Jolio Kjuri) staris antaŭ elekto — ĉu estiĝi futbalisto aŭ dediĉi sin al la scienco. Tiu ĉi elekto precipe akre staris antaŭ li post la matĉo inter la landaj teamoj de Francio kaj Britio. Tiam la ludo de la juna Joliot estis rimarkita de la profesiaj futbal-menaĝeroj kaj ankoraŭ en la vestiblo post la venko oni proponis al kontrakti por transiri en la ekipon de „Rasing“.

Eĉ fariĝinte tutmonde konata scienculo Joliot-Curie daŭre dediĉis grandan parton de sia tre minimuma libera tempo al la sporto. Dum la vintro li preskaŭ ne demetis la skiojn almenaŭ por 15 tagoj en la Alpoj. Dum la somero li dediĉis sin al fiŝkaptado. Kompreneble, tio ne estas la plena nomaro. Kiam li praktikadis la alpinismon, li atingis supron de la Alpoj alta 4665 metrojn.

El „Paco“, 6/1976

NOTINDA FAKTO

En USSR aperis la dua eldono de lernolibro de rusa stenografio de V. V. Gerasimov*. Por pruvi sian aserton pri la universaleco de la rusa ŝtata stenografio, en la ĉapitro „Stenografio-poligloto“ la aŭtoro donas stenogramojn de tekstoj en la lingvoj ukraina, blankrusa, latina, angla, franca, germana, hispana, ĉeĥa, pola, bulgara kaj Esperanto. La teksto de la lasta stenogramo estas la versaĵo de la rusa klasika poeto M. Lermontov „La velo“ en E-traduko de K. Gusev.

En la sama ĉapitro estas donitaj ankaŭ la stenografiaj signoj por la literoj de la latina alfabeto kaj por la specifaj literoj aŭ literkombinaĵoj en la menciitaj lingvoj, uzantaj la latinan alfabeton, surbaze de iliaj prononcoj. En Esperanto tute specifaj estas nur la literoj ĝ, ĥ, ĥ kaj ŭ.

* V. V. Gerasimov, Stenografija, dua eldono, Viŝeŝaja ŝkola, Minsk, 1975.



D. H.

En Vraca post multjara malsanado forpasis tre juna — en sia 42-jara aĝo —

ENJO DASKALOV

Li estas fondinto de lernejana E-societo „Anne Frank“ en la teksta teknikumo en Vraca, membro de la Centra Estraro de BEA kaj multjara instruisto de Esperanto en la teknikumo.

Enjo Daskalov laboris abnegacie kaj apostole por Esperanto kaj lia laboro lasos daŭrajn spurojn en la E-movado en Vraca kaj ĝis distrikto.



KONKURSO DE MONDA TURISMO

Tiuj du pentraĵoj enhavas sep diferencojn. Ilin malkovru, detale priskribu kaj sendu al Monda Turismo, p. k. 45, 1000 Sofio, Bulgario.

En la Internacia Renkontiĝo de Esperantistoj-Naturamiko, kiu okazos en julio, oni lotumos ses premiojn inter la trafe respondintoj. La nomojn de la gajnintoj ni aperigos en «Bulgara Esperantisto».

DEZIRAS KORESPONDI

Bulgario

Nadejda Dimitrova — ESPU „D. Blagoev“, 4831 *Dospat*, Smoljansko (24-jara fraŭlino, instruistino).

Maria Balinova — ESPU „D. Blagoev“, 4831 *Dospat*, Smoljansko (lernantino en 7-a klaso).

Gelernantoj 10-jaraj, en III-a klaso, dez. kor. tutmonde, interŝanĝi bk, fotojn, gram. diskojn, diapozitivojn. Skribu al ilia kursgvidantino: Dafinka Petrova Ilieva, 4000 *Plovdiv*, P. K. 151.

Josif Hristov Peĉinov — 6300 *Ĥaskovo*, str. Rakovska 75, ap. 22 (14-jara lernanto — pk, bk).

Teodor Stajkov Todorov — 6300 *Ĥaskovo*, str. Akacija 32 — (14-jara lernanto).

Veselina Cvetanova Panĉeva — 6300

2-A INTERNACIA E-LABORBRIGADO EN HUNGARIO

Turkeve, 10 de julio — 3 de aŭgusto 1977

Post la sukcesa pasintjara brigado en u. Turkeve, kiun partoprenis 50 geesperantistoj el Bulgario, Hungario, Jugoslavio kaj Pollando, ni alvokas al partopreno en ĉi-jara laborbrigado en la sama urbo.

Loĝado: en 4-litaj ĉambroj de moderna studenta domo.

Manĝado: 4-foje dum la tago.

Labortagoj: 17, porekskursoj — 5 tagoj. Ĉiutage 7 laborhoroj, verŝajne

ĉe fosado de kanalo. La ceteran tempon: prelegoj, ekskursetoj, banado, naĝado, boatado en rivereto, muzik- kaj dancvesperoj.

Ĉe la brigadfino oni repagas la vetur-kostojn por la teritorio de Hungario.

Limdato por aliĝo: la 1 de majo 1977. Povas aliĝi nur esperantistoj minimume 16-jaraj.

Adreso: *Földvari László, H-5420, Turkeve, Arpad u. 11, Hungario.*

Ĥaskovo, str. Rakovska 73, vh. V, ap. 20 (14-jara lernantino — kolek. bk).

Ekaterina Ilieva Nikolova — 6300 *Ĥaskovo*, kv. Orfej, vh. G, ap. 70 (14-jara lernantino — kol. bk).

Ivanka Teneva — 6300 *Ĥaskovo*, kv. Orfej — 3, vh. A, ap. 2 (14-jara lernantino — bk, insignojn).

Stefana Apostolova — str. Malĉika 3, *Burgas* (24-jara oficistino).

Toder Minkov Todorov — bul. Iv. Vezov 3, *Burgas*.

Sultanka Dimitrova — str. S'raŝa 1, vh. II, P. K. 6, *Burgas* (23-jara oficistino).

Milka Borisova — str. Hr. Smirnenki 8, *Burgas* (25-jara laboristino).

Hungario

F-ino Dancs Gabriella, H-8985 *Becsúölgye*, Ŭj ut. 4/a.

F-ino Gaztonai Ágóra H-8900 *Zalaegerszeg*, Landerhegyi u. 3.

F-ino Horváth Ildikó, H-8900 *Zalaegerszeg*, Egy F. u. 2. B. I/6.

F-ino Virraszó Anikó, H-8900 *Zalaegerszeg*, Gasparich u. 17/8.

Tornyos Sándor, H-8999 *Budafa*, Hunyadi u. 63.

F-ino Geiger Erzsébet, H-8900 *Zalaegerszeg*, Ságvási u. 21—23.

Szekér Károly, H-8900 *Zalaegerszeg*, Becsali u. 8.

Ollár Csaba, H-8900 *Zalaegerszeg*, Lenin u. 15.

Pollando

Skolta Esperanto-Teamo, P. K. 16, PL 50—952 *Wrocław* 17 (kun skoltaj teamoj per bk, prospektoj, E-ajoj k'p.).

Marek Olanowski — 42—640 *Piekary Sl.*, ul. Bytomska 92/22 (19-jara — kun gebulgaroj)

Terez Zygmunt — *Nalenczow* 24—140, ul. Lipowa 11 (28-jara instruisto — sporto, muziko, filmo).

Andrzej Dzienciowski — 09—514 *Białostok*, woj. Plakie (14-jara lernanto — muziko-sporto).

Ryszard Cieřlik — 59—414 *Dobromierz*, str. Koscielna 1-a, woj. Walbrzych (23-jara oficisto — kun ĉi pri muziko, kino, teatro, pm, bk, fotoj ĉe famaj geaktoroj ka.).

Lech Matoszek — ul. Stok Lacki 47, 08—110 *Siedlce* (kun junaj geesperantistoj).

Jan Kozuch — ul. Nowowiejska 22/96, 25 532 *Kielce* (32-jara teknikisto — kun gebulgaroj: sporto, turismo, pm).

Emilia Wojtakowska — P. O. Kesto 312 Pl 50—950 *Wrocław* 2 (sistema kolektantino — interŝanĝas E-revuojn, librojn).

Magdziak Teresa — 22—174 Brzno, woj. *Chelm* (18-jara — muziko, foto, biologio).

Grazyna Zalewska — PLSP (internat) 16—030 *Suprasl* (17-jara — bk, fotoj de aktoroj, junulara vivo).

Sovetunio

Bajamotov T. — str. Amurskaja 18—110, *Ust-Kamenogorsk* 492025, Kazahio (studento — kun gejunuloj el ĉi).

Jarapejzik Teofan Fjodoroviĉ — prospekt Mira 76/3, kv. 23, *Hmelnickij-15* (20-jara laboristo — kun ĉi pri foto, interlingvistiko, vortaroj).

Bulat Bitenov — *Omsk* 644077, str. Parkovaja 40, kv. 526 (28-jara studento-juristo — kun gejunuloj pri sporto, muziko, foto ka.).

Ljuda Leontjeva — *Omsk* 644042, str. Irtiřskaja nabereřnaja 14, kv. 138 (18-jara studentino de filologio).

Lena Popova — *Omsk* 644033, vojen. lorodok 17, d. 83, kv. 1 (19-jara studentino de kemio).

Aleksej Levako — *Omsk* 644077, Prospekt Mira 56, kv. 6 (18-jara studento de fiziko).

Andreo Horev — 700125, *Tařkent* 125, Visokovoltnij, ul. Sajfulina 4 (15-jara — interŝanĝas bk, pm, kantojn, humuraĵojn ka.).